8-a Jaro — No 7 VERSCHIJNT MAANDELIJKS Januaro 1937

# FLANDRA ESPERANTISTO

## MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA ESPERANTO MOVADO

Officieel Orgaan
van den

**Vlaamschen Esperantisten - Bond**



Administranto: A. De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.
Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.
Eksterlando: 6 belgoj.

# Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

**Magdalenastraat, 29, KORTRIJK**

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

| | | |
|---|---|---|
| En okcidento nenio nova — Remarque | Fr. 55,— | bind |
| La Viro el Francujo — Ivans | 29,— | » |
| Per Balono al la Poluso — Andrée | 65,— | » |
| Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim | 29,— | » |
| La Ora ŝtuparo — Oppenheim | 29,— | » |
| Ŝi — H. Rider Haggard | 29,— | » |
| Tra la Labirinto de la Gramatiko | 45,— | » |
| Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans | 7,50 | broŝ. |
| Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor | 10,— | » |
| La Du Amatinoj — de Musset | 7,50 | » |
| La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf | 12,— | » |
| Gösta Berling — S. Lagerlöf | 45,— | » |
| La Homaj rasoj de la Mondo | 24,— | » |
| Kudlago, la malgranda eskimo | 5,— | » |
| La Juno Vivo (1934-1935) | 15,— | » |
| Pallieter — F. Timmermans | 35,— | » |
| Barbro kaj Eriko — Letera romaneto | 4,— | » |
| Anni kaj Montmartre — R. Schwartz | 18,— | » |
| Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy | 18,— | » |
| Gaja Lernolibro (ilustrita) | 12,— | » |
| Examenopgaven | 12,— | » |
| Jubileumboek (Fed. Arbeiders Esperantisten) | 10,— | » |
| Blinda Rozo — H. Conscience | 4,— | » |
| Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck | 5,— | » |
| Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden) | 2,50 | » |
| Schidlof Zakwoordenboek | 30,— | » |
| Flandra Esper. 2 a, 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj | 15,— | » |
| Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1) | 10,— | » |

**INSIGNOJ:** Malgranda verda stelo: 2.00 fr.
Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.
Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.
Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.


**Glumarkoj,** en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Krajono kun surpreso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

# Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:
C. Schroeyers
Transvaalstraat, 10
Berchem
Antwerpen

Administranto:
Adolf De Keyzer
P. vanHumbeekstr., 3
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj
Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.
Eksterlando: 6 belgoj
Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT, H. VAN DURME kaj aliaj.

*N.K.L.E.* (Nia Estas La Estonteco)
Flandra Esperantista Grupo
Ejo * Breughel *
Em. Jacqmainlaan, 37, Brussel (Belg.)

## Ni rikoltu !

*Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, —*
*Ni semas kaj semas konstante.*

L. L. Zamenhof en « La Vojo ».

Jes, ni semu konstante, sed ni ankaŭ rikoltu. Dense kaj abunde la semo estas disĵetita dum la nuna vintro en Flandrujo : stabo da idealistaj kaj fervoraj propagandistoj senlace agas por Esperanto, krome la ligo disponas pri 4 profesiaj kaj kapablaj Cseh-instruistoj kiuj sukcese laboras. En pli ol 40 lokoj nia ligo organizis aŭ organizas kursojn en kiuj centoj da lernantoj nun verdiĝas, ĝis en urbetoj kaj vilaĝoj, kie neniam antaŭe okazis poresperantan propagandon, ni penetris... Ĉu la rikolto estos proporcia ?

La rikolto dependas de ni ĉiuj kaj tutspeciale de niaj instruistoj kaj organizantoj. Rikolti montriĝis tasko multe pli malfacila ol semado, ĉar ĝi postulas certagradan lertecon kaj takton.

La ĉefa kondiĉo por efike varbi estas metoda preparo de la kursanoj. Ne sufiĉas alvoko dum la lasta leciono aŭ dum kursfina festo, ni devas prilabori la kursanojn dum la tuta kurso kaj tiun laboron ni komencu, se eble, jam en la unua leciono.

Ni konsciu bone, ke la lernantoj ne montros emon por eniri movadon kaj aboni revuon de ili nekonata. Naivulo nur povas kredi, ke post nura invito, la lernantoj eniros la organizitan Esperanto-movadon. Ankaŭ evitinda estas insistado, ĝi nur forigas la lernantojn. Ni prefere rakontu je la fino de ĉiu leciono kaj dum nur kelkaj minutoj, pri Zamenhof kaj pri la organizita Esperanto-movado aŭ ni voĉlegu el F. E. interesajn artikolojn kaj sciigojn pri la internacia lingvo, Unuvorte ni ne nur instruu Esperanton sed formu Esperantistojn !

Por akceli la varbadon de novaj abonantoj, la ligestraro organizis varbkonkurson kun valoraj libro-premioj. Per ĝi ne nur niaj aktivaj propagandistoj akiros meritítan rekompencon sed por ĉiu estas kreita la ebleco pliampleksigi sian librokolekton per valoraj verkoj. Tial : ni rikoltu !

E. C.

---

La Flandra Ligo Esperantista deziras al ĉiuj siaj membroj kaj al ĉiuj gesamideanoj en la tuta mondo, feliĉon, sanon kaj prosperon por la jaro 1937.

La Estraro.

---

# Esperanto in de Praktijk.

*ENGELAND.*

Het tijdschrift « International Good Templar », orgaan der anti-alkoholistische beweging der Goede Tempelieren, publiceert regelmatig artikels in Esperanto. Deze vereeniging telt onder haar leden talrijke Esperantisten.

Ter gelegenheid van het internationaal Esperanto-kongres van « Sennacieca Asocio Tutmonda » te Manchester, werd voor de eerste maal in Esperanto uitgezonden in Engeland.

*ESTONIE.*

Als publiciteit voor de befaamde slijk- en zeebaden van het kuuroord Pärnu werd een gidsje uitgegeven in Esperanto. De brochure wordt aan belangstellenden gratis toegezonden; te bevragen bij: Urba Bandirekcio Pärnu, Estonio.

*FRANKRIJK.*

De ambassadeur van Zweden te Parijs berichtte aan de « Radio Club Espérantiste de France » welke het tijdschrift « Internacia S. O. S. Bulteno » uitgeeft, dat de Zweedsche radio-stations den derden Donderdag van ieder maand voordrachten over Esperanto van professor Björn Collinder zullen uitzenden.

*JOEGO-SLAVIE.*

Het stadsbestuur van Ljubljana, hoofdstad van Slovenië, liet onlangs een toeristisch folder verschijnen in Esperanto. Deze geïllus-

treerde uitgave met omslag in kleurendruk is kosteloos verkrijgbaar bij : « Tujskoprometni svet mesta Ljubljana », Auerspergova palača, Ljubljana, Jugoslavio.

*LIECHTENSTEIN.*

De regeering van het prinsdom gaf een propagandabrochure in het licht. Dit werkje, door talrijke fotos verlucht, bevat nuttige inlichtingen voor toeristen en is uitsluitend in Esperanto gesteld. Het kan worden aangevraagd bij : « Hohe Regierung » Vaduz, Liechtenstein.

*NEDERLAND.*

Tweemaal in de week verschijnen Esperanto-rubrieken in de dagbladen uitgegeven door de maatschappij « De Arbeiderspers ».

Door de zorgen van de Federatie van Arbeiders-Esperantisten zal om de veertien dagen een artistiek programma worden uitgezonden door de radio-omroep van Hilversum.

*NOORWEGEN.*

Door het kantoor voor vreemdelingenverkeer van Oslo werd een prijskamp voor Esperantisten uitgeschreven. De voorwaarden en het onderwerp verschenen in het weekblad « Oslo denne uke » welke regelmatig artikels in Esperanto publiceert.

*ROEMENIE.*

De kinderkrant « Uj Cimbora » (De Nieuwe Kameraad) welke driemaal in de maand verschijnt, heeft aangevangen met de publicatie van een Esperanto-kursus voor kinderen.

*TSJECHO-SLOWAKIJE.*

Nopens het kuuroord Karlsbad (Karlovy Vary) verscheen een rijk geïllustreerd folder in Esperanto met inlichtingen over de befaamde geneeskrachtige bronnen.

Het ministerie van staatsspoorwegen liet een reeks van drie gidsjes in het Esperanto verschijnen. Deze gidsjes worden door talrijke fotos verlucht en bevatten elk een geografische kaart van Tsjecho-Slowakije.

Het weekblad « Letzte Politik », orgaan der politieke vereeniging « Die Deutsche Justitianer », wijdt in elk nummer een of twee bladz. aan Esperanto.

*ZWEDEN.*

Het internationaal verbond der blinden-Esperantisten telt leden in 25 verschillende landen en heeft haar hoofdzetel te Stocksund. Het orgaan dezer vereeniging « Esperanta Ligilo » verschijnt in Braille-schrift. Verschillende belangrijke werken w. o. « Fundamenta Krestomatio de Esperanto » werden door de zorgen van het verbond in Braille uitgegeven.

**Varbu Abonantojn !**

(vidu paĝojn 104 kaj 105)

# Kunveno de Flandra Ligo Esperantista

BRUSSEL, 13 DECEMBRO 1936

Estis reprezentataj : la sekcioj Aalst, Antwerpen, Brussel, Kortrijk, Leuven, Mechelen, Oostende. Sin senkulpigis : sekcio Roeselare. Ĉeestis : la reprezentantoj el Assche, Astene, Gent, Ronse.

La kunveno senrimarke aprobis la raporton de la antaŭa kunsido.

Al la ĉeestantaj delegitoj kaj reprezentantoj estis disdonata ekzempleron de la bela afiŝo eldonita de la Kongreskomitato en Varsovio kaj ilustritan faldprospekton pri Liechtenstein.

La prezidanto demandis al S.ano De Boes ĉu li konsentas daŭrigi la organizadon kaj gvidadon de la migranta ekspozicio, kies starigo estis planita antaŭ kelkaj jaroj sed kiu neniam plene efektiviĝis. S.ano De Boes volonte akceptis kaj akcentis, ke la graveco de la ekspozicio dependos de la kvanto da materialo metota je lia dispono. Kiel ekzempla ago, la prezidanto donacis sian tutan propran kolekton kiu konsistas el granda kvanto da libretoj, afiŝoj, prospektoj, broŝuroj kaj aliaj objektoj taŭgaj por ekspozicio. S.ano De Boes danke akceptis la donacon kaj esprimis la esperon, ke la prezidanto trovos imitantojn. Por ebligi bonan laboron al S.ano De Boes, la kunveno disponebligis sumon de 100 Fr. al la migranta ekspozicio. De la libroj ricevitaj por recenzo, ekzemplero eniros la kolekton. La ekspozicia materialo estas je la dispono de la sekcio kaj reprezentantoj kontraŭ nura pago de la sendkostoj.

Koncerne la Cseh-kursoj, la prezidanto esprimis la bedaŭron, ke en kelkaj sekcioj oni ne volas kompreni ilian gravecon, kvankam pli kaj pli montriĝas ke nur per ili estas ebla grandskala laboro.

El la diskuto pri tiu punkto rezultis tamen, ke, se la kursoj estas prefektaj, ilia aranĝo en la komenco certagrade estis konfuza. Ĉar aŭdiĝis plendoj pri la organizado, S.ano Rainson diris, ke la liga kaso estis malplena kiam li komencis la propagandon kaj ke tute ne ekzistis entuziasmo por la nova metodo, tiel ke al li ne restis alian eliron ol riski la entreprenon propriniciate. La liga sekretario imitis la ekzemplon, ekzemplo kiu ŝajne fariĝis epidemia ĉar ankaŭ ligestrarano Lenaers komencis la organizon de kursoj en Hamme kaj ĉirkaŭaĵo. Tiuj disaj agoj minacas konduki al ĥaoso kaj urĝe necesas krei ordon. Tial la kunveno decidis centrigi ĉiujn Cseh-kursojn kaj okazigi ilin je nomo de Flandra Ligo Esperantista. La prezidanto, S.ano Rainson, kiu akiris grandan sperton sur tiu kampo, estos la organiza gvidanto.

Nunmomente laboras en Flandrujo 2 Cseh-instruistoj ĉekoslovakaj, nome : S.oj Franz Heidler kaj Karolo Ŝolc en kies kursoj centoj da personoj partoprenas. Baldaŭ ni disponos pri tria eksterlanda instruisto, la nederlandano Sipke Stuit.

La Cseh-instruisto Henk Tien, ankaŭ ĉeestante la kunvenon, demandis kiel li devas sin konsideri, ĉu laborante private aŭ cŭ por la Ligo ? S.ano Rainson respondis ke li volonte envicigos instruiston H. Tien, se li akceptas labori por la Ligo.

La Cseh-kursoj ĝenerale bone sukcesas laŭ pedagogia vidpunkto. Tamen la profito por la Ligo ne ĉiam estas proporcia. Plejofte la Cseh-instruistoj havas emon speciale varbi por eksterlandaj gazetoj kaj apenaŭ, aŭ eĉ tute ne mencias nian revuon. Pro tia agado Duffel prokrastas sian aliĝon al la Ligo ; tie la Esperantistoj preskaŭ senescepte abonis alilandan gazeton. Nepre necesas, ke la Cseh-instruistoj kiuj laboras je la servo de Flandra Ligo, unuavice propagandu por nia revuo. Ĉi tiun sezonon okazos ankoraŭ proksimume 25 kursoj, ni atendas de ili la prosperon de la Ligo.

Je demando de la delegito el Leuven, kiu ne povis resti ĝis la fino de la kunveno, okazis ŝanĝo en la tagordo kaj estis pritraktata unue punkto 9. S.ano Cnops komunikis la provizoran programon de nia kongreso ; li speciale insistas por ĝustatempa mendo de loĝado ĉar en Leuven la loĝadebleco estas limigita. La prezidanto proponis anstataŭi la dimanĉan festenon per bona tagmanĝo, kies maksimuma prezo estu 15 Fr. kun trinkmono sed sen trinkaĵo. Tiun proponon la kunveno akceptis por ebligi ĝeneralan partoprenon en tiu aranĝo. Por siaj kunvenoj la kongreso disponos pri la kinejo « Lovanium ».

La delegitoj kaj reprezentantoj raportis pri la situacio en siaj respektivaj lokoj. En Leuven la situacio ne estas brila : la sekcio nombras tie 13 anojn el kiuj nur 3 abonas nian organon. Cseh-kurso tie estas sukcese organizita. La delegito de sekcio Leuven promesis insisti por ŝanĝi la situacion en la sekcio. En Aalst mankas aktivuloj ; paro da fraŭlinoj tie gvidas la sekcian vivon kaj kuraĝe propagandas. S.ano Rainson helpos per la organizo de Cseh-kurso. En Antwerpen S.anoj Van Durme kaj Verheyden instruas. Kun alia Esperanto-societo okazas traktado por starigo de neŭtrala proganda komitato. En Wilrijk sin prezentis nur 7 personoj por la Cseh-kurso, ĉar ne sufiĉas por speciala instruisto, ĝin gvidos S.ano Rainson. En Brussel la Cseh-kurso de S.ano Ornstein ne donis novajn liganojn. Delegito Broodcoorens raportas pri la klopodoj de la propagandisto Buenting el Nederlanda Hindujo kiu nun laboras en Brussel. En tiu urbo reprezentantaro de ĉiuj lokaj grupoj funkcias (escepte de la laboristaj kluboj kiuj obstine rifuzas kunlabori kun « burĝoj »). En Brussel rezultatoj estas nur akireblaj por Flandra Ligo, propagandante en flandraj medioj. Libro-metoda kurso funkcias kun 9 lernantoj kiuj venis post sendo de 200 cirkuleroj. Sekcio Brugge petis registri sian momentan likvidiĝon ; universitataj studoj malebligas aktivecon al la lokaj gvidantoj. S.ano Rainson ekzamenos la eblecon tie organizi Cseh-kurson. Sekcio Oostende rilatas kun Blankenberge por la organizo de Cseh-kurso, en Oostende mem ankaŭ estas en preparo tia kurso. La sekcio promesis liveri novajn abonojn. En Mechelen ĉiuj membroj devas aboni, escepte la familianoj ; la kotizo estas 1 Fr. semajne kaj entenas la abonon. En Assche kaj Gent la kursoj malsukcesis. En Gent nova Cseh-kurso estas en preparo. La reprezentanto el Astene prilaboris Deinze ; la ligestraro esperas de li fervoran propagandon por la Ligo. En Kortrijk, post iom da ripozo (?) la sekcio vekiĝis, plijuniĝis kaj esperas rapide reakiri sian antaŭan prosperon. Ronse organizos Cseh-kurson. Momente funkcias librometoda kurso kun malmultaj lernantoj.

*N.E.L.E.* (Nia Estas La ...)
Flandra Esperantista Grupo
Ejo * Breughel *
Em. Jacqmainlaan, 37, Brussel (Belg.)

Ĝis antaŭ nelonge la sekcioj kaj la ligo restis kvazaŭ fremdaj la unu por la alia. Dum la kongreso en Gent estis decidita alporti radikalan ŝanĝon en tio. Multon ni jam atingis sed kompletan harmonion ni nur atingos kiam ĉiuj sekcioj senescepte havos daŭran kontakton kun la ligo kaj sendos regule delegiton al la kunvenoj. Senkulpigoj absolute ne plu estas akcepteblaj ; ni ripetas, ke al la sekcioj kies financa situacio estas malbona kaj kiuj petas tion al la ligestraro, estos repagata la duono de la vojaĝelspezoj. La ligo ankaŭ esperas ke la sekcioj konscience plenumos la taskon de perantoj inter la Ligo kaj la liganoj. Tiu tasko konsistas ĉefe el la varbado de membroj kaj abonantoj kaj la sendado de la adresoj kaj kotizoj al la centro. Dezirinda estas ankaŭ ke ĉiu sekcio senescepte aperigu regule kronikon en la rubriko « Grupa Vivo » de F. E. La varbado de anoncoj por F. E. tute ne estas kontentiga ; nur sekcio Antwerpen faris ion.

Ni ne forgesu la ĝeneralan taskon : varbado de minimume 100 novaj abonoj kiuj ankoraŭ mankas por certigi la memstarecon al F.E. La estraro, dezirante doni viglan impulson al tiu varbado, starigis premisistemon kaj decidis aperigi allogan varbkonkurson en F. E.

La tre longa kaj detala pritrakto de la unuaj punktoj de la tagordo malebligis longan priparolon de la ceteraj punktoj.

La prezidanto klarigis la novan situacion kiu estiĝis en la internacia movado pro la paralela ekzisto de U. E. A. kaj I. E. L.

Nia instituto baldaŭ disponos pri la nova, abunde ilustrita lernolibro de Dro F. Szilagyi. Estis konfirmita la decido konsenti rabaton nur al la sekcioj kaj reprezentantoj de F. L.

La propagando en la gazetoj estu pli intensa. Ĝis la starigi de speciala gazetservo, ĉiu kolektu la gravajn artikolojn kiuj aperas pri Esperanto.

S.ano Volders, la prizorganto de la rubriko « La Angulo de la Serĉemuloj » en F. E., plendas ĉar li ne disponas pri premioj por la konkursoj. La kunveno decidis disponebligi al li sumon de 60 Fr. por tiu celo.

Cseh-instruisto Solc proponis la starigon de bicikla rondo kun la intenco organizi biciklan vojaĝon al Ĉekoslovakio. Interesiĝantoj povas peti detalajn klarigojn de li aŭ de la Liga prezidanto.

La venonta ligkunveno okazos en Brussel la 14-an de Marto 1937.

LA SEKRETARIO.

# 8a flandra kongreso de Esperanto

DE LA 15a ĜIS LA 17a DE MAJO 1937

Ĉiun korespondajon sendu al la sekretario de la O. K. : Lode Cnops, Broekstraat, 21, Heverlee.

Monsendojn direktu al S.ino De Kesel, Bondgenootenlaan, 177, Leuven ; P. C. 196.161.

Glumarkoj trikoloraj haveblaj po 6 fr. la 100.

Kotizo 12 fr. por Liganoj, 15 fr. por Gastoj.

* * *

PROVIZORA PROGRAMO

*Sabato 15-5 :*

Akcepto de la kongresanoj depost la tria en Flandra Domo.

20 Malfermo de la Kongreso Laborkunsido F. L. E.
Interkonatiĝvespero.

*Dimanĉo 16-5 :*

8.30 Katolika Diservo en la preĝejo de la Dominikanoj. Poste, Promenadeto tra la Urbo.

10.30 Fotografado sur la ŝtuparo de la Juĝejo.

11 Akcepto de la Kongresanoj en la Urbodomo.

12 Kunveno de F. L. E. en kinejo « Lovanium ».

13 Festeno, en la Restaŭracio « Monico ».

15.30 Vizito al Sta Petro preĝejo.

17 Sonorilarkoncerto.

20 En Restaŭracio « Monico » : ESPERANTO BALO.

*Lundo 17-5 :*

9.30 Kunveno antaŭ la Flandra Domo kaj sekvantara iro al la Stacidomo kie atendas la tramoj.

10 Forveturado al Tervueren.

*Tervueren :*

10.40 Alveno.

11 Vizito al la Muzeo kaj- aŭ Parko.

12.30 Tagmanĝo.

14 Vizito al la Kirmeso.

16.40 Forveturado.

*Loveno :*

17.20 Alveno.
Komuna Tagmanĝo kaj Adiaŭa vespero.

* * *

PREZOJ

*Loĝado* Luksa Hotelo : Ĉambro por unu persono : 40 fr.; ĉambro por du personoj, po persono : 25 fr.

Bona Hotelo : Ĉambro por unu persono : 40, 35, 30, 25 fr. ; ĉambro kun unu lito por du personoj : 70, 55, 45 fr. ; ĉambro kun du litoj, tri personoj : 70, 65 fr.

Ĉiuj *kun* matenmanĝo kaj trinkmono.

N. B. — Tre malmultaj unulitaj ĉambroj estas haveblaj. Pripensu tuj al la loĝado por ke vi konforte loĝu.

*Festeno :* 20 fr. *kun* trinkmono, *sen* trinkaĵo.

*Ekskurzo :* 16 fr. por tramveturado kaj tagmanĝo.

# Dankon !

Pro la multaj dankesprimoj ricevitaj okaze de mia 60a naskiĝtago mi esprimas mian tutkoran dankon al miaj honorintoj, enlandaj kaj eksterdandaj.

Antwerpen. J. VAN AS.

Al ĉiuj esperantistaj geamikoj en la mondo mi deziras feliĉan kaj prosperan novjaron (1937).

J. VAN AS.

Se vi deziras, ke Flandra Esperantisto fariĝu inda organo de nia movado,

VARBU NOVAJN ABONANTOJN KAJ GAJNU VALORAJN LIBRO-PREMIOJN

*REGULOJ DE LA KONKURSO :*

1. Varbantoj de novaj abonantoj rajtas elekti libro-premiojn el la koncernaj serioj.
2. Al ĉiu estas permesata partopreni en la varbkonkurso, ĉu individue, ĉu grupe.
3. La varbantoj mem kolektu kaj ensendu la abonkotizojn ; ABONPREZO : 1 jaro : 20 Fr., 1/2 jaro : 10 Fr.
4. La novaj abonantoj devas esti personoj, kiuj antaŭe ne estis abonantoj de F. E.
5. En la varbkonkurso unu tutjara abono valoras du duonjarajn abonojn.
6. Tuj, kaj laŭ la varbeblecoj, oni ensendu abonkotizojn kaj adresojn kun la mencio : Varbkonkurso.
7. Kiam la ensendoj rajtigas al premio oni povas ĝin tuj peti aŭ daŭrigi la varbadon.
8. Ensendojn por la varbkonkurso ni akceptas ĝis la 14-a de Marto 1937.
9. La abonkotizojn oni pagu pere de poŝtĉeknumero 232150 de Flandra Ligo Esperantista.
10. Adresarojn kaj eventualajn korespondajojn oni sendu al la administracio de Flandra Esperantisto, P. van Humbeekstr., 3, Brussel (West).

## SERIO I

*Por 3 duonjarabonoj*

1. Blinda Rozo.
2. Barbro kaj Eriko.
3. Kudlago, la Eskimo.

## SERIO II

*Por 5 duonjarabonoj*

4. Amo kaj Poezio.
5. Elektitaj Noveloj.
6. La du Amatinoj.

## SERIO III

*Por 10 duonjarabonoj*

7. Anni kaj Montmartre.
8. Szilagyi lernolibro.
9. Verdaj Donkiĥotoj.

## SERIO IV

*Por 20 duonjarabonoj*

10. La Viro el Francujo.
11. Riĉa kaj sen Mono.
12. La Ora Stuparo.
13. Pallieter.
14. Schidlof Zakwoordenboek.

## SERIO V

*Por 30 duonjarabonoj*

15. Tra la labirinto.
16. Per Balono al la Poluso.
17. En Okcidento Nenio Nova.
18. Gösta Berling.
19. La Leono de Flandrujo.

## SERIO VI

*Por 50 duonjarabonoj*

20. Groot Woordenboek Van Straaten.
21. Plena Vortaro de Esperanto.

*Ĉiuj premioj el la serioj IV, V kaj VI estas ampleksaj kaj plaĉaspekte binditaj verkoj.*

# Loveno

Estus eble interese por la estontaj kongresanoj scii ion pri la historio de nia kongresurbo por 1937.

La historio de Loveno jam frue komencas, laŭ ĉiu ebleco en la XIa jarcento. Tiam la grafo Lamberto Barbata konstruis kastelon sur insuleto en la Dilo, tie kie nun estas la preĝejo de la dominikanoj. Sur la krucpunkto de la vojoj al Flandrujo, Norda-Brabanto, Lieĝo kaj Namuro li konstruis preĝejon dediĉita al Sta Petro. Ĉirkaŭ tiuj centroj, la milita kaj la spirita, kolektiĝis komercistoj kaj metiistoj kaj ekestis la urbo Loveno. Oni nun ankoraŭ vidas, en la urba parko kaj en la « Handbooghof », la restaĵojn de la fortifikaĵoj konstruitaj en 1149.

Dum la XIIa jarcento, Loveno estis vera komunumo kun propra urbrajtoj, skabinaro kaj urbestro kiu estris la urbon por la grafo.

Dum la regno de la brabanta duko kaj lovena grafo Henriko I (1190-1235), oni konstruis sur la nuna « Oude Markt », la Viandhalon », la « Fiŝhalon » kaj la « Panejon », La ŝtoffarado tiam estis la precipa komerco, kaj la lovenaj vendistoj iris kun siaj varoj al Anglujo, Germanujo, k.t.p. Meze de la XIIIa jarcento, la estintaj fortifikaĵoj jam estis tro malgrandaj.

Ĝis la komenco de la XIVa jarcento, la patricianoj estris la urbon, sed en 1302, kiam la demokratio eniris Flandrujon, tiam la komercistoj kaj laboristoj revoluciis kaj la duko Johanno II estis devigita persone veni al Loveno. Tamen en 1317, oni konstruis la ŝtofhalojn kiuj, ekde la XVa jarcento servis kiel centra ejo de la universitato.

Nova demokratia revolucio okazis dum la regno de Johanino kaj Wenceslao (1536-1383) kiam Petro Coutereel kaj poste Waltero vander Leyden, per terorista politiko, venkis la patricianojn.

La 9an de Decembro 1425, dum la regno de grafo Johano IV, fondiĝis la lovena universitato.

La prospera perioda de Loveno komencis kun la regno de la « granda grafo » Filipo la Bona. La malnovaj domoj mezepokaj estis anstataŭitaj per novaj, lumaj domoj. Sulpicio vander Vorst konstruis la novan pregejon de Sta Petro, Johano van Ruusbroeck la turon de la Sta Gertrudo-preĝejo kaj Matio de Layens, la mirigan urbdomon. La pentristoj Roelof van Velpen, Rogier vander Weyden kaj Dirk Bouts pliriĉigis la pentrarton. En 1466, en la Meĥlena strato, naskiĝis Quinten Metsys.

La imperiestro Karolo V nenion ŝanĝis kaj li multfoje loĝis en sia kastelo sur la « Keizersberg » por ĉeesti la faman lovenan kirmeson. Lia instruisto, Willem van Croy, konstruis la belegan kastelon de Heverlee, kiun poste okupis la dukoj von Ahrenberg, kaj kie nun estas la teĥnikaj lernejoj de la universitato.

Kun la regno de Filipo II ankaŭ komencis la mizero, sed tio ŝanĝiĝis kun Alberto kaj Isabelo (1598-1621). Mi ne povas silenti pri gravega fakto por nia nacia historia : en 1635 la francaj kaj holandaj armeoj sieĝis Lovenon ; se tiam Loveno estus estinta venkita, Belgujo ke nun ne ekzistus : Richelieu kaj Frederiko-Henriko interkonsentis ke post la venko, nia lando estus dividita inter Francujo kaj Holando.

Denove riĉeco revenis al Loveno dum la aŭstria dominacio, precipe dum la regno de Maria-Theresia. Tiam ekestis led-, glas- kaj bierfabrikoj. Loveno tiam nombris 42 grandajn bierfabrikojn kiuj jare elportis 130.000 barelojn da biero.

Loveno partoprenis al la revolucio kontraŭ Jozefo II en 1789. Dum la revolucia regimo, ankoraŭ mizero alvenis kaj kiam Bonaparte vizitis la urbon en 1803 oni sciigis ĝin al li. Nenio tamen ŝanĝis. En 1814 la holanda regno klopodis redoni la pasintan riĉecon sed ĝi ne sukcesis kaj kompreneble la lovena loĝantaro kore partoprenis al la 1830a revolucio. Sylvain van de Weyer, membro de la provizora estraro estis lovenano. La lovena universitato, kiu konatigis Lovenon al la mondo, remalfermis en Decembro 1835.

Bedaŭrinde, ankaŭ alia famo alvenis al Loveno. Kiu ne rememoras ke la 25an de Aŭgusto 1914, la germana generalo van Boehn ordonis la masakron de 217 senkulpaj loĝantoj, kaj ke dum tiu terureco bruliĝis 1120 domoj, la biblioteko de la Universitato, le preĝejo de Sta Petro kaj multaj aliaj publikaj konstruaĵoj ? Tiujn faktojn oni enskribos en la historio, ne por instigi la malamon, sed ĉar la vero postulas ĝin : Francs-Tireurs » ne ekzistis en Loveno en 1914 : nur senkulpaj loĝantoj estis viktimoj de incititaj kaj ebriaj soldatoj.

Sur la ruinoj de Loveno, kiu tiel akre pagis sian parton en la sendependeco de la lando, rekonstruiĝis nova urbo, kiu kun la mondfama Universitato, reprenos sian celon de la « bona brabanta urbo », kaj ankaŭ tie nun okazos kongreso celanta al nova idealo, la plej alta kiu iam ekzistis en la mondo.

Lode CNOPS.

# En Leuven regas la plezur' !...

Kiam ĉiujare la veraj Bruselanoj kaj nefalsigitaj Bruselaninoj vizitas la Urbon de la « Peetermannen », okaze de la Septembra Kirmeso, tiam sonas plengorĝe tra la stratoj, tra la foiro, en la multaj trinkejoj, kie estas verŝata la bonega, jarcentaĝa Lovena Biero, tiu refreno, kiu estas konata de Haspengouw ĝis ĉe la Nordmara Strando :

« *In Leuven is het zoo plezant !* »
(En Leuven regas la Plezur' !)

Se ni devas kredi kion la «Radio» rakontas, la kirmeson de Loveno ni dankas ankaŭ al la malvenko de tiuj Normanoj en la jaro 891... ĉar nia tre piaj praavoj pretendis ke estis perhelpe de la Dipatrino Mario, ke ili sukcesis subpremi tiujn, malĝentilajn turistojn. Nu, laŭ la analoj de Fulda, (kaj ankaŭ, por ne esti plagiatisto, laŭ la radiodisertacio de Septembro 1936), reĝo Arnulfo, la triumfanto, ordinis la kanton de litanioj kaj organizis procesiojn je la honoro de Dio...

Sed de la relegia festo devenas ĉiam la profanaj festoj... kaj certa estas (ĉiam laŭ la Radio) ke en la jaro 1390, flanke la relegia procesio, ankaŭ estis organizata « Ommeganck », fermata de la gildoj

kaj metioj. Tie trenis la gigantoj Herkulo kaj Megera, kun siaj infanoj kaj servistoj... kaj la kvar fratoj sur la ĉevalo Bayard ne mankis en la « Kavalkado ».

Do certe la Normanoj meritas iom da danko pro sia vizito en la naŭa jarcento post J. K., ĉar ili malvenkis, kaj ke tiel la procesio, kaj la Ommeganck... kaj la kermeso estis organizataj... kaj do ankaŭ depost tiom da jarcentoj... en Leuven regas la Plezur' !...

Ni nun ne grimacu, tial estas Jozefo II, tiu reĝo-pedelo, kaj finfine la Franca revolucio, kiuj malpermesis la procesion kaj la reston. Ĉar la Gloro de la Lovena kirmeso restis, sen de 'l gigantoj promenado... Kaj tiel ankaŭ en Leuven regas la plezur !... Pri tio ni ne dubas, ni plene kredas la Radion : la Lovena Kirmeso ĉiam sukcesas jar' post jaro !...

Kvankam ne nur en Bruselo, tiu fakto estas konata, ni tamen dubis, ke en Leuven ja regas sufiĉe da plezuro, ankaŭ tiam kiam ne estas kirmeso. Ĉar Leuven, karaj gesamedeanoj, estas la urbo de nia Oka ! Kaj rajte, niaj kongresanoj, kiuj malpravas pesimismon kaj nigran arton, deziras ion koni pri la urbo, la urbanoj kaj la kongresurbsamideanoj !

Oni demandis al ni, preni sur niaj delikataj ŝultroj tiel pezan taskon : Konatigi al la kandidat-kongresisto de la oka, kiel ja estas la « elspiraĵo » de tiu nova kongres-urbo.

Kaj ni devas atesti... Leuven, ankaŭ por ni, estis granda demandsigno, ĝis kiam ni kuraĝe esploris la « nekonataĵon » !

Sed karaj gesamideanoj, ĝoju jam kun ni, la interkonatiĝo estis pli ol bona...

Ni esploris la spiriton de la universitata urbo, (tre teda afero, eble !), sed ni trovis la studentan spiriton, la flandran studentan spiriton.

Ni trovis, ni lernis kiel antaŭe en la lernejo pri la sep ĉefpekoj, kaj pri la sep faroj de kompatemeco... Ni lernis parkere, ni diras, ne la sep mirindaĵojn de la mondo, ĉar ekster la tro konata piramidoj de Egiptujo, ni malkonis la ses aliajn, ne, ne, ni nur lernis la sep mirindaĵojn de... Loveno !

« *La sonorilo ekster*
» *La turo sen...*
» *La vivantoj irante sub...* »

Ne, ni paciencu iom, miaj karaj gesamideanoj... Ni estas tiel entuziasmaj ke ni ja tuj plenigus tutan kajeron de Flandra Esperantisto per Lovena enciklopedio. Ni ja interkonatiĝis kun Loveno, kun la lovena vivo, la lovena spirito, la lovena estint', estant' kaj estonteco ! Sed nur iom post iom, kiel frandaĵo al infanetoj, ni rakontos ĉion al vi...

Vi konos la interesan historion de Loveno, kiel vi konas la historion de Adamo kaj de Evo...

Vi parkere deklamos la sep mirindaĵojn de Loveno kiel via « Patro-nia ! ».

Vi legos pri la studentoj mezepokaj, modernaj.

Vi eklernos promenadi tra Loveno kaj altŝati ĉion vidindeblan.

Vi entuziasmiĝos pri la urbo de nia oka, tiel ke je Pentekosto

« en Leuven regos la plezuro », tiel senbride, tiel senhaltigeble... ke la Lovenanoj mem, kiuj tamen ne timas por malgranda bruo, vere kredus ke jam la Septembra kirmeso, kiun ni ŝuldas al la tre estimataj Normanoj), tiun jaron eksplodas kvar monatojn pli frue...

*En Leuven regos la plezur' !*

Pol VAN DER POEL.

* * *

*Daŭriga volumo de Enciklopedio de Esperanto.*

estas plenforte redaktata kaj aperos en la jaro 1938. Por posedantoj de la unuaj du volumoj la eldonejo ebligas favorprezan aĉeton al la tria volumo kaj pro tio ĝi sendis detalan oferton al ĉiuj el ili. Se iu posedanto ne ricevas tian oferton ĝis la 1-a de januaro, bonvolu pri tio skribi rekte al la eldonejo Literatura Mondo.

Budapest, IX. Soroksari-ut, 38.

* * *

*Por nia skribmaŝino.*

S.ro Snykers, Oostende . . . . . . . . . . . . . . . . 80 Fr.
S.ro De Ruyver, Pol . . . . . . . . . . . . . . . . . 5 Fr.
S.ro De Boes, Gerard . . . . . . . . . . . . . . . . . 5 Fr.

* * *

*Por la Revuo.*

Jet . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . , 10 Fr,
Amiko Antwerpen . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 30 Fr.

# Grupa Vivo

*ANTWERPEN* — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

La 18an de Novembro okazis la parolado de Sr Lodema en nia ejo « Nieuwe Carnot » pri « La pilotado sur la Skeldo ». Multaj gesamideanoj de aliaj grupoj ĉeestis. Parolado kiu bone sukcesis. Kiel ĉiujare nia mitulfesto okazis la 21an en « Pallietershuis ». La mituloj estis bongustaj kaj la ĉeestantoj amuzis sin bone. La 2an de Decembro oni festis nian feliĉan amikon Sr Van As pro lia 60a naskiĝtago.

La festo finiĝis je la 1a horo matene.

*BRUSSEL* — N. E. L. E.

La 26-an de Novembro nia prezidanto, S.ano G. Broodcoorens, parolis pri Esperanto por la anoj de la loka sekcio de Davidsfonds. Okaze de tiu parolado, kies temo estis « Het vraagstuk der internationale taal », niaj anoj aranĝis malgrandan ekspozicion kaj vendis lernolibrojn kaj vortaretojn.

Nun okazas en nia ejo libro-metoda kurso en kiu partoprenas deko da lernantoj. La nombro ne estas granda, ni despli kalkulas je la kvalito !

*KORTRIJK.*

Ĉi tiun jaron la loka grupo staris ĉe la rando de likvidiĝo. Iam tre floranta, ĝi konstante perdis membrojn sen kompenso per akiro de novaj adeptoj ; ĉiuj la rimedoj uzitaj por reagi restis senefikaj. La 2 aŭ 3 restantaj aktivuloj ne malesperiĝis kaj kiam la krizo estis plej akra venis la savo sub formo de Cseh-kurso : 44 novaj kursanoj plus deko da malnovaj grupanoj ! Eĉ konsentante ke Cseh-metodo ne komplete formas esperantiston, ĝi liveris la mirindan rezultaton ke komencinte kun 44 ĝi finis kun 44, dum ke antaŭe oni ĝojis kiam nur la duono forkuris antaŭ la fino.

Tia kurso kompreneble ne povis fini sen inda festo ; la sukceso de la festo valoris tiun de la kurso ĉar venis proksimume 300 personoj ; certmomente estis apenaŭ eble sin movi en la salono. Kaj la sekreto por tia rezultato ? Ni promesis libropremion al ĉiuj vendontaj minimume 10 kartojn.

Samgrade sukcesis la parolado de S.ro Scherer ; ĝi okazis je nomo de V. T. B. sed estas la grupo kiu organizis kaj propagandis. Estis jam de jaroj ke V. T. B. ne plu registris tiom da intereso por parolado ; ĉar sur la propagandiloj (intence !) ne estis menciate ke temus pri parolado en Esperanto, kelkaj grumblis je la komenco sed tuj sekvis ĝenerala admiro por la belaj lumbildoj. La tradukadon faris S.ano Debrouwere sed pluraj personoj diris ke eĉ sen traduko ili komprenis preskaŭ la duonon. Je nomo de la turista asocio, S.ro advokato Vandekerckhove prezentis S.ron Scherer kaj akcentis pri la interesa eksperimento uzanta la helplingvon por ebligi la aperon de eksterlanda paroladisto antaŭ flandra publiko. Estis tre valora propagandvespero, kiu havis la avantaĝon nenion kosti al la grupo, ĉar pro la amaso, la malgranda enirprezo (1 fr.) sufiĉis por kovri la kostojn.

*MECHELEN* — LA ESTONTO.

Post bona propagando kaj gezetanoncado ankaŭ en Mechelen ni organizis Ĉe-kurson, kiu tamen ne akiris la saman sukceson ol la pasintan jaron. Tamen esperplenaj lernantoj sin inskribigis kaj ni esperas je altkvalita rikolto.

Ni regule kunvenas en la hejma « Frascati » kaj studas, interparolas, ludas, kantas esperantlingve.

Ni tamen faras varman alvokon por ke la membroj pli regule kaj pli multnombre ĉeestu. En la tutmonda krizo oni ja ne ŝparas Esperanton, kaj malgraŭ la bela florado de la movado en diversaj landoj, necesas ke ĉiu vera esperantisto komprenu ke necesas ke ankaŭ li restu sur la paca batalfronto de interkompreniĝo per interpopola lingvo.

*RONSE* — « LA PACA STELO ».

Kun nova jaro ni komencas kun nova kuraĝo kaj en tiu ĉi monato ni havas antaŭ ĉio la gravan ĝeneralan kunvenon al kiu ni invitas nian kompletan membraron. Unu de tiuj-ĉi semajnoj nia S.ano Geenens donos interesan gramatikan lecionon al kiu ĉiuj estas invitataj, nov — kaj malnovuloj — Nian kantvesperon ni ne forlasas.

Jen pri la agado de nia grupvivo.

Je la 14a de Decembro ni venigis en nian medion « S.ro Scherer » el Kalifornio « Los Angeles » kaj tiu-ĉi bone & famkonata mondvojaĝanto donis al ni tre pleninteresan vesperon per temo « Japanujo kaj ĝia intima vivo » kies parolado estis tradukita nederlandlingve de S.ro De Boes. — Ni notas kun ĝojo ke ekster la Gesamideanoj ni rimarkis dekoj & dekojn da ne-esperantistoj. La salono de Concordia kie la lumbildparolado okazis enhavis larĝe 80 aŭskultantojn. Jam de la antaŭa vespera nia standardo flirtis al la fasado kune kun la afiŝetoj diskonigante tiun paroladiston, kiu aperis por la unua fojo en la urbo, per nura Esperanto-teksto.

Kaŭze de tio-ĉio, ni prokrastis nian librotagon kaj la gesamideanoj estas petataj kontroli kaj relegi nian monatan grupprogramon por ke ili ne forrestu al aĉeto de almenaŭ UNU libro.

Por fini, ankaŭ jara vespermanĝo bone sukcesis, ĉar 33 gemanĝemuloj estis al tabloj por forgluti la manĝajojn kaj samtempe malsekigi la gorĝojn.

Kiel vi povas rimarki, ni bone fermis la jaron kaj nun al konstanta laboro por komenci la tutnovan 1937-an jaron.

*VICHTE* — WAREGEM.

Pluraj el la novaj samideanoj el Vichte partoprenis la Cseh-kurson en Kortrijk. Ilia nombro estas sufiĉe granda por fondi memstaran sekcion en Vichte, sed ni aŭdis ke ili iras al la klubvesperoj en Kortrijk. Certe estas tre kuraĝe fari ĉiusemajne tiun vojaĝon sed aliflanke tiel riskas perdiĝi por la movado la gesamideanoj kiuj ne povas iri al Kortrijk. Estus preferinde starigi klubon en sia vilaĝo kaj klopodi ke novaj Vichte-anoj lernu Esperanton ; tio tamen ne malhelpus ke tiuj kiuj povas, venu al Kortrijk por pliferfektiĝi.

En Waregem ĉiuj estas novuloj kaj ili ne bone scias kion fari por gardi la kontakton. La distanco ĝis Vichte estas nur 5 km. Ĉu la kamaradoj el Vichte kiuj estas tiel vojaĝemaj ne povus veni de tempo al tempo al Waregem por komune labori ?

# La Angulo de la Serĉemuloj

Estimataj Gesolvistoj,

Jam unu jaron nun mi prizorgas la « Angulo(n) de la Serĉemulo ». Kiam mi rerigardas tiun foran jaron, mi povas esti kontenta, ĉar mi trovis sufiĉe da geinteresuloj, kiuj preskaŭ regule ensendis siajn solvojn. Tamen por la venonta jaro mi atendas ankoraŭ multe pli da solvistoj ol la pasinta jaro. Restas ĉiam tro multe da personoj kiuj nenian sin okupas pri la krucvortoj kaj aliaj problemoj, kvankam ili ege meritas la atenton de ĉiuj. Estas agrabla tempforigo, vi multe lernos kaj povas gajni premion. Mi do esperas ke ĉiuj tiun-ĉi jaron partoprenos al la solvado, ankaŭ la prudentuloj kaj saĝuloj. Por instigi ankaŭ tiujn lastajn mi promesas krom la kutimaj du premioj fordoni ankaŭ unu belegan specialan premion por kiu havos la plej multe da poentoj je la fino de 1937. Ĉiumonate estos menciata la nombro de gajneblaj poentoj, kaj aperos en F. L. E. la nomoj de la tri unuaj solvistoj kun iliaj respektivaj poentoj.


Tiamaniere, ĉiuj povas sekvi la batalon.

Esperante konatiĝi kun multe da novaj solvist(in)oj, mi deziras al vi ĉiuj bonan kaj feliĉan jaron, kaj BONAN ŜANCON !

F. VOLDERS.

PROBLEMO 16

*PLEKTLABORO — 8 POENTOJ*




1-3 Fiŝo.
1-7 Kampliton.
2-6 Venigi komercaĵojn el fremdlando.
3-5 Floro.
8-4 Tute okupi la pensojn, la atenton.
5-7 Ĥemia elemento (R).
1-5 Nomo de famkonata Esperanto Gazeto.
3-7 Birdo (pasero kaj merlspeco) (R).
La vortoj kun (R) estas radikoj.

PROBLEMO 17 (3 POENTOJ)

Se vi havas ĉiujn bonaĵojn de la mondo.
Se vi estas la plej feliĉa en la rondo.
Se vi estas sana kiel fiŝo en akvujo.
Se vi vivas kiel Dio en Francujo.
Kaj se poste al ĉielo vi irus.
Mi scias kion mi ankoraŭ pli ŝatus.
Ĉu ankaŭ la legantoj ?

Por ĉiu problemo ni forlotumos unu premion. La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Februaro 1937, rekte al S.ro F. VOLDERS, Bredastraat, 94, Antwerpen.

*Premioj.* — Por la problemo 12 gajnis premion Fraŭlinoj Van der Mast kaj E. Callewaert.

Por la problemo 13 gajnis premion Fraŭlino Van der Mast kaj Sinjoro Pittoors.

SOLVO DE PROBLEMO 12

*Horizontale :* profan — stomak — rat — api — od — mar — ski — il — cel — koket — aleo — ekip — lak — brak — pot — rab — praktik — boa — fak — idol — ido — ĵoke — aer — anonc — lit — se — ard — dek — ar — ole — dia — rakont — presil.

*Vertikale :* proces — piastr — dek — dec — or — lip — bor — ok fam — popol — alo — atak — tra — aren — rol — ind — kaskado — sek — ond — takt — rif — cedr — opi — bakaĵ — kie — mi — arb — kol — as — ila — kia — kolekt — petrol.

SOLVO DE PROBLEMO 13

*Horizontale :* ebria — dieco — rid — tie — imagoj — tajlor — mes — lulil — eva — imit — dam — prov — kal — ali — vortaro — fok — tml — atol — oka — bute — nur — aromo — des — citato — orgeno — ero — gaj — anemi — bilet.

*Vertikale :* limig — danci — mem — tiu — brasik — forten — rig — tavol — are — idol — lok — atom — jud — oro — laktuko — tim — amo — ital — art — orgi — eij — plomb — gal — celeri — ludeje — ovo — ten — grava — sesop.

# FLANDRA LIGO ESPERANTISTA
## (Vlaamsche Esperantisten - Bond)

**Voorzitter:** H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
**Ondervoorzitter:** E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
**Sekretaris:** Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
**Penningmeester:** Adolf De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
**Propaganda:** Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
**Postchek:** Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50.
**Orgaan:** « Flandra Esperantisto », maandblad.
**Lidmaatschap:** 5 fr.; met maandblad: 25 fr.

### AFDEELINGEN:

**Aalst:** « Pioniro ». Sekr.: Denderstraat, 20.
**Antwerpen:** « Flandrema Grupo Esperantista ». Sekr.: Statiestraat, 156, Berchem. ... ... ...
**Brugge:** « Katolika Junulara Esperanto-Grupo », Guido Gezellelaan, 15.
**Brussel:** « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. Van Humbeekstr., 3.
**Kortrijk:** « Esperantista Grupo ». Sekr.: Moeskroenstraat, 9.
**Leuven:** « Nova Tagiĝo » Sekr.: Tienschestraat, 106.
**Oostende:** « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Oudenburgsche stwg., 8.
**Mechelen:** « La Estonto ». Sekr.: Vekestraat, 25.
**Roeselaere:** « Ruselare Esperantista Grupo ».

### VERTEGENWOORDIGERS:

**Arendonk:** A. De Troeyer, Gasthuisstraat, 98.
**Assche:** L. De Rop, Tenberg, 24.
**Astene:** M. Vanderlinden, Dorp, 54.
**Gent:** F-ino J. Terryn, Raapstraat, 82.
**Harelbeke:** A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.
**Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.
**Ronse:** G. De Boes, Wijnstraat, 81.
**Tielt:** R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.
**Vichte:** G. Faveere, Statiestraat.
**Wilrijck:** D. Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.

Ingevolge besluiten genomen tijdens de Kongresvergadering te Gent, betrekkelijk de werking en het beheer van den Bond, zijn al de groepen en vertegenwoordigers uitgenoodigd geworden hunne vraag tot aansluiting schriftelijk te vernieuwen.

Hierboven zijn alleen vermeld deze die hieraan gevolg gegeven hebben vóór 15 December. De andere zullen opgenomen worden in de volgende nummers.

Een oproep is ook gedaan tot de personen welke bereid zijn de taak van vertegenwoordiger te aanvaarden in de plaatsen waar F.L.E. er nog geen bezit. Toetredingsbulletijnen hiervoor mogen aangevraagd worden aan het sekretariaat.

**JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.**
**Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.**
**Eksterlando: 6 belgoj.**
« Presejo de l' Centro », Kipdorpvest, 26, Antwerpen.

OSTENDO

# HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

“BREUGHEL”

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacqmainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)




DRUKKERIJ

Aŭtomata Presejo

## H. BRAEKEVELT

Statiedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.
Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.
Liveras al la diversoj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.
**Tel.: 1080.**

## Café “Nieuwe Carnot”

FRANS NEEFS-D'HELDT

**Carnotstraat, 70 — Antwerpen**

Plej bonaj trinkaĵoj.
Salonoj por societoj — Malvarmaj manĝaĵoj — Bonega servado.

**Ejo de Flandrema Grupo.**

LUOTA

**1/4 pago: 75 fr. por 12 monatoj;**
**50 fr. por 6 monatoj.**

**1/8 paĝo: 50 fr. por 12 monatoj.**
**30 fr. por 6 monatoj.**

« Presejo de l' Centro », Kipdorpvest, 26, Antwerpen.